Provenca Esperanto-Federacio
kvaronjara gazeto
142
aŭtuno 2025

esperanto Provence

**Leĝa depono ĉe BNF**
ISSN 2609-5203

**Federacia retejo**
www.esperanto-provence.org

**Prezidanto**
Rosy Inaudi - 06 18 35 18 40
r.inaudi@free.fr

**Aliĝkotizo (kun la gazeto) : 10€**
> ĉeko al : Espéranto-Provence
pere de via loka asocio
aŭ sendota al la kasisto
Marc Gallardo
Les Hespérides II Bât. B2
67 bd des Alpes- 13012 Marseille
gallardomarc@ymail.com
06 09 89 09 14
> aŭ bankĝiro
(bankinformoj sendotaj laŭpete)

Por Esperanto-Marseille la kotizo devas esti pagita al Esperanto-France
https://esperanto-france.org

**Redaktoro**
Pascal Panarotto - 06 26 34 30 93
ilarione13@outlook.fr

**Grafikistino**
Mh Bertucceli
mhbertucceli@gmail.com

**Limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta n°**
15-a de decembro 2025
bonvolu sendi al la supra retadreso

★ ★ ★

antaŭdankojn pro viaj kontribuaĵoj

## Vorto de la redaktoro

Unue, mi volas paroli pri Alain REMY, nia prezidanto Esperanto Provence, forpasinta pasintan someron, la 30-an de julio. Ni pensas pri li kaj mi resendas al la gazeto numero 138 por la omaĝo. Ĉiuj esperantistoj en la Provenco, ĉefe, ne forgesos lin.

Due, tiu gazeto parolos ĉefe pri la Universala Kongreso de Esperanto en Brno (Ĉeĥio) (Tchéquie).

Vi trovas fotojn pri la kongreso en Brno ĉi-malsupre kaj vi trovos aliajn fotojn kun la artikoloj pri la kongreso.

La esperantistoj de Marsejlo pasigis mirandan restadon, vi vIdos tiun al vi kaj ke ili komunikos sian entuziasmon.

Finfine, vi trovos la aliĝilon al la staĝoj en la regiono (la GARDE kaj les ISSAMBRES).

Ĝis revido.

★ ★ ★

# Fokuso

Se ni volas konigi nian duan lingvon la Esperanto, ni povas havi simplajn gestojn.

Eksemplo: tiu somero, mi decidis meti etiketon «ESPERANTO» sur la ventoŝirmilon (pare-brise) de mia aŭto. La garaĝisto vidis ĝin kaj li demandis al mi: Kio estas esperanto ?

Alia ekzemplo: mia amikino de Svislando, eksperto en lingvoj, demandis al mi : Kio estas esperanto?

Morgaŭ, ŝi revenis hejmen, ŝi diris kiam mi vidis: Saluton kiel vi fartas? La bùs' al orele (le bouche à oreille) tie ĉi funkcias!! Kaj la valoroj kiuj ni portas ankaŭ PACO, FRATECO, HUMANISMO ni donas ESPERO...

# Enhavo


| | |
|---|---|
| 3 | Imagu nova mondo : mondo, kiam ĉiuj parolas esperanton |
| 4-5 | UK : Kutima kaj sukcesa UK en Brno<br>Pourquoi l'esperanto est mieux que l'anglais |
| 6-7 | UK : Résolution du 110e Congrès mondial d'espéranto<br>à Brno, Tchéquie |
| 8-9 | UK : Universala Kongreso de Esperanto 2025 en Brno |
| 10-11 | UK : Kiam plantoj parolas sen vortoj |
| 12 | UK : Demenco kaj dulingvismo |
| 13 | INOE : Esperanto kaj naturismo kongruas ! |
| 14-15 | SAT : Deklaracio de la 98-a kongreso |
| 16 | Legado : pravi dorso Rumfer |
| 17 | Salon des auteurs ciotadens / Forum des associations |
| 18 | Correns : Conférence et concert |
| 19 | Recepto |
| 20 | Agendo |

# Imagu nova mondo : mondo, kiam ĉiuj parolas Esperanton

*Marc Gallardo*

John Lennon imagis mondon sen limoj, sen landoj. Ĉi tiu mondo nun eknaskiĝas.

Nia planedon estas sen baroj, sen miskomprenoj, sen muraj vandoj inter homoj. Tie la homaro finfine malkovras sian plej grandan trezoron: unu komunan voĉon. Tiu voĉo estas Esperanto.

En tiu mondo, la vizaĝoi en la metroo ne plu aspektas fremdaj. Ĉiu rideto fariĝas invito al konversacio. La vojaĝanto en Marrakeŝo facile interŝanĝas rakontojn kun vilaĝano el Tibeto. La studento en Brazilo trinkas teon kun sia amikino el Koreio, sen eĉ rimarki, ke ili iam parolis malsamajn gepatrajn lingvojn.



La novaĵoj cirkulas tra la Tero kiel pura aero: sciencaj malkovroj ne plu restas kaŝitaj, literaturo ne plu fermiĝas en naciaj limoj, kaj ĉiu homo povas rakonti sian historion al la tuta homaro.

En la bazaro de Istanbulo, inter la parfumoj de spicoj, oni aŭdas ridon universalan.

En la stratoj de Barcelono, muzikistoj kreas kantojn, kiuj tuj estas komprenataj en ĉiuj kontinentoj. En la lernejoj de Afriko, Eŭropo, Ameriko kaj Azio, infanoj kune kunkantas, ĉar la vortoj apartenas al ili ĉiuj.

La plej influaj ŝtatestroj de la mondo renkontiĝas kaj interŝanĝas ideojn, kiujfariĝas komunaj. Kaj vespere, kiam la suno subiras, la homaro eksentas ion mirindan: ni jam ne plu estas dividitaj en "ili" kaj "ni". Ni ĉiuj estas parto de unu granda rondo, sidantaj ĉirkaŭ la sama fajro, kun la steloj super niaj kapoj kiel komuna plafono.

Ĉu tio estas revo ? Jes. Sed ĉiufoje kiam ni diras "Saluton, amiko", la revo jam komenciĝas.

## Kutima kaj sukcesa UK en BRNO (Ĉekio)

*Renée Triolle*

La 110 Universala Kongreso de UEA estis mia 37a (se mi ĝuste kalkulis). Meza nombro da partoprenantoj 1200 el sesdeko da landoj: kiel kutime la francoj estis la plej nombraj, el Provenco venis 14 homoj. Se informadiko ĉiam pli uziĝas, mi ĝojis retrovi la rendevuan tabulon kun diverskoloraj slipetoj por alvoki homojn: iuj retrovis min, lastfoje ni renkontiĝis en 1968! Kiel kutime, ne imagebla bunta programo, alloga por ĉiuspecaj kongresanoj: kultura kun koncertoj, filmoj, teatraĵoj, scienca kun 17 prelegoj (longaj por Internacia Kongresa Universitato, pli mallongaj por la sciencaj kafejoj, ĉiuj estas legeblaj en la libro, kiu kompilas ilin; instrua kun lingvo-kursoj, KER-ekzamenoj, Tago de la lernado kaj AMO-seminario, sporta: la Esperanto-teamo venkis la lokan ĉe futbalmatĉo! beletra; tre granda libro-servo kaj duon-horoj por intervjui verkistojn; ekskursa: merkrede tuttagaj, kaj multaj aliaj ĉiutage; informaj pri la gastiganta lando, esperantologio. Sed la UK estas la okazo diskuti la laborplanon de la asocio, kun komitatkunsidoj, elekto de nova estraro, diskuto de la kongresa temo «Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj» dum aliaj fakaj asocioj okazigis siajn membrokunvenojn.

La Movada Foiro donas impreson pri la bunteco de la movado, ĉiuj el ni povas trovi fakon, kiu plej interesas lin (komerco, naturismo, feriejoj, biciklado, ktp).

La kongresejo (spektakloj okazis en apuda hotelo) estis tre moderna universitato Mendel, teknike belege ekipita, sed ekster la urbo: sekve la kongresanoj ne estis tre videblaj! En la koridoroj staris ekspozicioj pri filatelio, rilatoj inter Ĉekio kaj Ĉinio. Ne mankis lokoj kie eblis sidi kaj trankvile babili, unu el la ĉefaj trajtoj de UK! La Loka Kongresa Komitato aranĝis, ke la studenta restoracio funkcios por ni (do eblis manĝi je malaltaj prezoj), la komunaj transportiloj estis senpagaj por la kongresanoj. Dankojn al ili kaj al la urbo BRNO. Venontjare la UK okazos en la sama regiono, en

Graz (Aŭstrio), kie en 1970 okazis la kongreso de TEJO. Ĉi jare la junuloj kongresis en Indonezio, tamen estis apartaj programeroj por la junularo.

Piedirado inter la du konstruaĵoj de la kongresejo kaj hotelo Cosmopolitan refreŝigis niajn mensojn kaj aktivigis niajn muskolojn. Prelego pri demenco kaj dulingvismo konfirmis, ke neniu povas eskapi demencon, Altzeimer (kunligitan al la maljuneco) sed dulingvismo ebligas, ke la eko de la malsano estas prokrastita do permesas gajni kelkajn jarojn sen demenco!

## Pourquoi l'espéranto est mieux que l'anglais

*Morgane Schmidt*

J'ai trouvé la réponse à cette question en me rendant cet été au congrès de Brno. J'apprenais l'espéranto depuis un an grâce aux cours en lignes, et j'avais décidé de mettre mes cours en pratique. Dès mon arrivée en gare de Brno, le ton est donné : je suis accueillie chaleureusement par des espérantistes qui m'accompagnent et m'orientent jusqu'au centre de congrès. Une fois mon étiquette et mon sac de congrès récupérés, je me rends à l'hôtel. Tous les gens que je croise me saluent avec un grand sourire et me mettent dans l'ambiance bienveillante et joviale qui sera celle de tout le congrès. Le soir, une slovène me demande si je n'ai pas trop froid, le lendemain un japonais me demande si j'ai bien dormi. Et les jours suivants, j'aurai l'occasion de parler avec des gens de Hongrie, de Corée, de Suisse, d'Allemagne, d'Autriche, du Brésil, de Belgique, d'Espagne… Et je découvre que parler espéranto avec ces gens n'a absolument rien à voir avec parler anglais. J'expérimente que parler espéranto, c'est sentir qu'on appartient à la même communauté. Et dans cette communauté humaniste, chacun peut être comme il veut, il n'y a pas de jugement, il n'y a que de la bienveillance. Vous trouvez ça un peu niais et très exagéré ? Venez tester l'année prochaine au congrès de Graz en Autriche.

# Résolution du 110e Congrès mondial d’espéranto à Brno, Tchéquie

Du 26 juillet au 2 août 2025, 1132 personnes venues de 63 pays se sont réunies à Brno, en Tchéquie, pour participer au 110e Congrès mondial d’espéranto. Nous avons discuté de l’espéranto et des technologies comme vecteurs de paix et de confiance entre les peuples. Parallèlement, nous avons démontré, par nos propres activités, l’efficacité de l’espéranto, langue internationale, comme passerelle entre des locuteurs de différents pays, aux expériences et opinions diverses. Après avoir limité l’étude des nouvelles technologies à leurs aspects communicationnels, nous avons rédigé un rapport et, sur cette base, la présente résolution :

- Nous constatons avec satisfaction que les nouvelles technologies de communication ont permis une augmentation significative du nombre de locuteurs d’espéranto atteignables, ce qui explique pourquoi la connaissance de l’espéranto dans un monde connecté devient de plus en plus précieuse pour instaurer la paix et la confiance entre les peuples ;
- Nous constatons que l’intelligence artificielle (IA) pour la traduction automatique et, grâce à elle, la communication multilingue sont devenues abordables et largement accessibles ;
- Parallèlement, nous constatons que les incitations à l’apprentissage des langues étrangères s’affaiblissent, notamment en raison de l’utilisation de l’IA, et que l’égalité linguistique se réduit, ce qui conduit à un provincialisme culturel ;
- Nous constatons avec inquiétude l’émergence d’une abondance de médias numériques, qui permettent à de nombreuses personnes de rejoindre des sources d’information

n'appartenant qu'à des groupes partageant les mêmes idées, renforçant ainsi la polarisation au sein de la société ;

• Nous soulignons que l'espéranto, de par ses aspects systémiques, est parfaitement adapté comme langue internationale et dispose déjà d'une communauté mondiale de locuteurs, laquelle, en tant que mouvement, soutient le respect et la valorisation des langues étrangères et de la diversité culturelle.

C'est pourquoi nous appelons les gouvernements et la société civile de tous les pays :

• à reprendre l'enseignement des langues voisines et à introduire l'espéranto comme matière scolaire afin de renforcer le contact direct avec les cultures voisines et une approche neutre des autres langues ;

• à œuvrer au renforcement du statut des langues locales et de l'espéranto par rapport aux langues hégémoniques.

**Nous concluons que :**

• la confiance mutuelle peut contribuer à un climat social harmonieux, respectueux, sûr et interculturel, et réduire les forces de division au sein de la société ;

• le respect des cultures locales véhiculées par les langues locales peut être ainsi consolidé, tout en renforçant la cohésion sociale pour la paix ;

• ainsi, les nouveaux moyens de communication pourront aider à construire des ponts entre les peuples et atténuer la tendance aux barrières et à la polarisation.



## Universala Kongreso de Esperanto 2025 en Brno (Ĉeĥio)

*Frédéric Gilles*

De la 26a de Julio ĝis la 2a de Aŭgusto 2025 okazis la 110a Universala Kongreso de Esperanto. Ĝi okazis en Brno (prononcu «Burno»). Brno estas la dua plej granda urbo en Ĉeĥio. Ĝi situas en la orienta parto de Ĉeĥio, en Moravia regiono, ne for de Aŭstrio kaj Slovakio.

En Ĉeĥio oni parolas la ĉeĥan, oni pagas per ĉeĥaj kronoj (ne eŭroj). Unu eŭro egalas proksimume 25 ĉeĥaj kronoj.

En restoracio, oni povas doni trinkmonon, sed ĝi ne estas devigata. La prezoj estas malpli altaj ol la francaj prezoj. Oni povas manĝi kompletan manĝon kontraŭ 8-14 eŭroj. En la manĝejo de la universitato, kie la kongreso okazis, la prezo de la manĝo estis laŭ pezo.




La ĉeĥoj estas la plej grandaj konzumantoj de biero en la mondo. Ili trinkas 128 litrojn da biero por persono jare. La plej fama biero en Brno estas la Starobrno, kies fabrikon mi vizitis.

La Universala Kongreso (UK) estas la plej granda renkontiĝo de esperantistoj en la mondo. Ĝi okazas ĉiujare en malsama lando. Ĉijare 1132 homoj el 63 landoj partoprenis. Naŭ homoj de Marsejlo partoprenis.





Multaj eventoj okazis :

- la solena inaŭguro
- la movada foiro kun budoj kiuj prezentas diversajn aferojn rilatajn al Esperanto
- la nacia vespero kun ĉeĥaj artistoj (muzikistoj, dancistoj)
- la kleriga lundo kun multaj prelegoj
- la tago de lernado
- prelegoj pri scienco
- multaj ekskursoj, tra aŭ ekster la urbo
- la KER ekzameno
- teatraĵoj
- multaj koncertoj posttagmeze kaj vespere
- la solena fermo kun muziko kaj kantoj

Tio estis la unua fojo ke mi renkontis fizike mian unuan instruistino de Esperanto, Karina Oliveira. Ŝi estas brazilanino kaj loĝas en Finnlando. Eble vi jam aŭdis pri ŝi; ŝi estas la ĉefredaktoro de Kontakto, la revuo de TEJO.

La lastan tagon la franca grupo tagmanĝis en la sama restoracio kiel Fernando Maia, la nova prezidanto de UEA.



Venontjare, la UK okazos en Grazo en Aŭstrio. Mi certe partoprenos.

## La provenceanoj en UK



*Romano, M-Hélène, Christophe, Marc, Rosy, Thierry,*



*Renée, Raymonde, Morgane*



*Jean-François, Vinko, Marica*



*Frédéric*



*Didier*

# Kiam plantoj "parolas" sen vortoj

*Marc Gallardo*

Kiam oni diras "vegeti", ni ofte pensas pri senmova, pasiva vivo. Sed la plantoj en nia ĝardeno aŭ ĝangalo eble protestus kontraŭ tio — se ili povus paroli. Scienco montras, ke ili jam komunikas, sentas kaj eĉ moviĝas… nur per aliaj rimedoj.

**Plantoj, kiuj ne nur vegetas**

Fine de julio 2025, dum la 110-a Universala Kongreso de Esperanto en Brno (Ĉeĥio), inter la multaj prelegoj estis unu, kiu vekis specialan intereson: "Vegetaĵoj ne vegetas: kiel plantoj sentas kaj moviĝas". La preleganto, Félix Hartmann, laboras ĉe la franca Nacia Instituto pri Esplorado pri Agrikulturo, Nutrado kaj Medio (INRAE). Lia celo pri la prelego



estas rompi la ideon, ke plantoj estas tute pasivaj estaĵoj.

Félix Hartmann klarigis, ke plantoj, malgraŭ la silenta vivo, havas mirindan kapablon percepti sian medion kaj reagi al ĝi, ofte en manieroj surprizaj por ni. Ili ne moviĝas kiel katoj aŭ birdoj, sed ili "decidas" sian kreskodirekton, fortigas siajn strukturojn, kaj eĉ komunikas inter si.

**De Aristotelo ĝis Darwin**

En la antikva mondo, Aristotelo klasifikis la vivon laŭ tri «animoj»: La Vegetativa por kreski, nutriĝi kaj reproduktiĝi,

la Sensiveca por percepti kaj moviĝi laŭvole, kaj la Intelecta por racii, kiu estas atributo propra al homoj.

Plantoj, laŭ tiu vidpunkto, havis nur la plej bazan "animonivelon" kaj do neniun veran senton aŭ moviĝkapablon. Sed en la 19-a jarcento, Charles Darwin renversis tiun penson. Li montris, ke ĉiuj vivaj estaĵoj — bestoj kaj plantoj — havas komunajn praulojn, kaj ke

iliaj diferencoj estas nur malsamaj strategioj por postvivi, ne pruvo pri iu hierarkio de “perfekteco”.

**Kiam plantoj moviĝas kaj “parolas”**

Darwin mem esploris plantajn moviĝojn en sia libro The Power of Movement in Plants (1880). Ekzemple:

- Fototropismo – tigoj kaj folioj kreskas al la direkto de la lumo.

- Tigmotropismo – plantoj reagas al tuŝo aŭ movo, ekzemple arboj submetitaj al vento plifortigas siajn trunkojn.

- Kemia komunikado – poploj, atakitaj de insektoj, produktas substancojn por malinstigi ilin, kaj samtempe eligas “odormesaĝojn” por averti najbarajn arbojn.

Tiaj faktoj nun interesas la kampon nomatan planta neŭrobiologio, kiu esploras kiel plantoj perceptas, prilaboras kaj transdonas informojn.

**Etikaj demandoj kaj kurioza muziko**

Se plantoj estas tiel atentaj al sia medio, ĉu ni devas repensi nian rilaton al ili? Alifanke kelkaj



esploroj jam sugestas, ke milda muziko, kiel tiu de Mozart aŭ Beethoven, povas stimuli la kreskon de certaj plantoj.

Ni parolis al Felix Hartmann pri aparato, kiu kaptas elektrajn signalojn de folioj kaj transformas ilin en aŭdeblajn sonojn.

Rezulto: “plantoj muzikigas”, kaj sonoj ŝajnas varii laŭ la specio. Ĉu bambuo sonus trankvile, kvazaŭ por meditado?

Ĉu aloeo havus “orientan” etoson? Ĉu tio estas serioza?

Felix respondas: ne tro. La eksperimentoj jam komenciĝis…

## Demenco kaj dulingvinsmo – Marta RUZZA cerba trejnado por pli longa mensa sano

*Rosy INAUDI*

La itala psikologo Marta Ruzza klarigis al ni la grandajn avantaĝojn de dulingvismo por la cerbo.

Esploroj montras, ke ĝi povas prokrasti la simptomojn de Alzheimer ĝis kvin jarojn kaj helpi konservi pli grandan hipokampon — regionon tre gravan por la memoro.

Parolado de du lingvoj stimulas la menson: ĝi plibonigas atenton, planadon, koncentriĝon kaj problemo-solvon. La dulingva cerbo funkcias pli efike kaj uzas siajn rimedojn ŝpareme.

Ĉi tio rilatas al pli bona konektiteco inter la neŭronoj kaj pli multaj sinapsoj.

Eĉ se oni lernas alian lingvon en malfrua aĝo, la efikoj estas rimarkindaj: rekonstruiĝo de cerbaj retoj, pli granda neŭroplasteco, kaj fortigo de la memoro de laboro kaj atentokapabloj. La dulingvismo estas do vera “cerba gimnastiko”.




Sed Marta Ruzza atentigas, ke ankaŭ aliaj aktivecoj gravas: kognaj trejnadoj, kiuj efikas eĉ je tre alta aĝo; fizika agado, kiu helpas memoron, humoron kaj moveblecon; kaj novaj interesaj okupoj, kiuj nutras la cerbon.

Ŝia konkludo estas klara: kombinu lingvolernadon kun mensaj ekzercoj, fizika agado kaj novaj defioj. Tiel vi donos al via cerbo la plej bonan ŝancon resti juna.

Esperantistoj, kiuj sekvas ŝiajn konsilojn, havos do, bonajn perspektivojn por longa vivo kun vigla menso!

# Esperanto kaj naturismo kongruas!

Esperanto kaj naturismo havas multajn komunajn valorojn. Esperanto estas bazita sur la respekto de aliuloj dank al la uzo de komuna neŭtrala lingvo kaj naturismo estas respekto de aliuloj dank al la praktiko de komuna nudeco.

Oni povas noti, ke Esperanto Provence estas la esperanta loka organizo, kiu enhavas la plej granda kvanto de naturistoj, en la mondo. Do sensurpreze, kiam INOE, Internacia Naturista Organizo Esperantista, organizas eventojn la provencanoj estas bone reprezentitaj.

Dum la pasinta somero, INOE organizis la sesan Verdan Naturisman Semajnon en la plej bela esperantejo en la mondo: la kastelo Greziljono, kiu situas en Baugé-en-Anjou, apud Angers.

Inter la 23 partoprenantoj, 6 estas ankaŭ membroj de Esperanto-Provence. Ĉu vi sukcesos indentifigi ilin sur tiu ĉi foto?



Tuj post la Verda Naturisma Semajno, INOE organizis unu semanan restadon en naturistejo Montalivet, apud Bordozo. Denove, la Provencanoj reprezentis 5 el la 8 partoprenantoj. Ni ankaŭ havis la ŝancon ricevi la viziton de Bernard kaj Rose Sarlandie, paron de Esperanto-Gironde. Denove, ĉu vi sukcesos indentifigi la provencanojn sur tiu ĉi foto?



Se vi estas naturisto aŭ simple pretas esplori pli simplan, agrablan kaj konfortan vivmanieron, kies valoroj kongruas kun tiuj de Esperanto, ne hezitu viziti la retejon de INOE: **www.esperanto-naturismo.org**

*Thierry Spanjaard*

Prezidanto de Esperanto Marseille,

Estrarano de Esperanto Provence

Prezidanto de INOE - Internacia Naturista Organizo Esperantista

# Deklaracio de la 98-a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT):

*Christophe Collay*

La 98-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kunveninta en Greziljono inter la 9-a kaj la 16-a de aŭgusto 2025:

– rekomendas, ke SAT profiliĝu kiel organizaĵo de maldekstraj esperantistoj, en kiu videblas la strebo instrumentigi Esperanton, interalie:

• por la emancipiĝo de la tutmonda laborista klaso kaj ĉiuj aliaj dominataj kaj subpremataj sociaj kategorioj,

• por progresiva redukto de socia malegaleco ene de landoj kaj mondnivele,

• por decida tutmonde kunordigita agado kontraŭ la ekologia difektiĝo de la planedo, tute aparte reage je la klimata krizo,

• por progreso ĝis mondo, en kiu kapitalismo malaperas kaj homekspluatado ne eblas;

• kontraŭ aŭtoritatismaj, eĉ faŝismaj tendencoj en multaj landoj,

• kontraŭ, imperiismo, imperiismaj militoj, naciismo, rasismo, ksenofobio, nativismo kaj mistraktado de migrantoj en la unuopaj landoj,

• kontraŭ seksismo, kapablismo, speciismo, GLAT-fobio;

– rekomendas klerigcelan agadon por tiuj celoj kaj kontraŭ tendenco konduki la Asocion al stato de ĝeneralcela politika debatejo, en kiu dekstraj kaj kontraŭemancipaj pozicioj aperas kvazaŭ samrange diskutindaj kiel la supre nomitaj;

– pledas por la retiriĝo de ĉiuj imperiismaj kaj ekspansiismaj landoj el teritorioj, kiujn ili senrajte okupacias, sekvota de adekvataj reparacioj – de Gazao ĝis Ukrainio, okupacio estas krimo!

– kondamnas imperiismon sen rezervoj motivitaj de kliniĝo al tiu aŭ alia mondpolitika tendaro;

– pledas por sistemo de interŝtataj rilatoj baziĝanta sur la internacia juro kaj kiel eble plej reprezentaj mondnivelaj institucioj;

– konstatas kun indigno la genocidan karakteron de la israela milito kontraŭ Gazao;

– postulas tujajn militĉesojn en Ukrainio, Palestino, Jemeno, Sudano, Sirio, Kongolando, k.a.;

– koncerne la kruelan kaj senfinan militon en Kivuo (D. R. Kongolando), firme kondamnas perfortaĵojn kaj krimojn kontraŭ la popolo fare de la diversaj ribeluloj, interalie M23 kaj ADF Nalu, de najbaraj landoj kaj de firmaoj, kiuj avide kaptas la riĉecon de la grundo; subtenas agadojn por denunci tiun militon kaj por repacigi Kivuon;

– proponas, ke la buĝetoj por gardi pacon (blukaskuloj kaj aliaj internaciaj rimedoj) multe pliiĝu;

– proponas ke atomarmiloj estu malpermesitaj en ĉiuj landoj; rememorigas pri tiamaj kaj daŭraj viktimoj de la bombado en Hiroŝimo kaj Nagasako, okazinta antaŭ 80 jaroj, kaj ĝi subtenas ĉiujn agadojn por paco kaj kontraŭ armiloj;

– postulas, ke kaj la nunaj terloĝantoj kaj niaj posteuloj ĝuu rajton dece kaj sekure vivi, por kio necesas zorgi kiel eble plej baldaŭ pri la rebonstatigo de ĉio, kio vivas;

– apogas la senpagajn magazenojn kaj aliajn iniciatojn por tiuj, kiuj malfacile povas libere aĉeti.



# Pravi dorso Rumfer

*Romain Beylerian*

Lastatempe, amiko pruntis al mi strangan bildstrion. Vi ŝategos, li diris. Ĝi nomiĝas Saga, ia kosma Romeo kaj Julieto skribita de Brajan K. Von (Brian K. Vaughan), la aŭtoro de multe famaj usonaj bildstrioj. Mi neniam aŭdis pri li ĝis nun.

Kia agrabla surprizo, kiam post kelkaj paĝoj, mi subite trovis konatajn vortojn, skribitaj en Esperanto! En tiu fantazia rakonto, unu el la du popoloj parolas Esperanton, la alia kompreneble parolas la lingvon de la leganto.




Ie, en la dua volumo mi trovis tre strangan frazon. Forirante de ĝi, infano diras al sia hundo «Pravi dorso Rumfer»... Kio? Mi komprenas ĉiun vorton, sed kune mi ne komprenas plu. Tiam, la frazo turniĝis en mia kapo. Pravi, mi komprenas. Dorso, mi ankaŭ komprenas, sen akuzativo estas iomete suspekte, eĉ kun akuzativo estas ankaŭ suspekte. Rumfer, verŝajne la nomo de la hundo.

Pravi dorso Rumfer. Scivole, Rumfer komprenis, mi ne. Ĉu dorso estas la subjekto? Ĉu la dorso pravis pri io? Kompreneble ne. Ni forgesu la frazon. Kion la infano dezirus diri al sia hundo, forirante de ĝi? Se mi estus aŭtoro el Usono, kion mi skribus en tiu bildo?

Mi skribus «I'll be right back Rumfer». Eble, pli mallonge «Be right back Rumfer». «Be back», je reviendrai, mi revenos. «Be right back», je reviens tout de suite, mi tuj revenos. Bone, do kial estas skribite pravi dorso? Finfine mi komprenis... la aŭtoro, aŭ la tradukistoj, tradukis ĉiujn vortojn, unu post unu!

«Be right» iĝas pravi, avoir raison; «back» iĝas dorso, (le) dos. Avoir raison dos. Almenaŭ Rumfer komprenis, ĝi estas la unua koncernata ĉu ne?

## Salon des auteurs ciotadens le 31 août dans la cour de l'Eden à La Ciotat

*Renée Triolle*

Je suis invitée parmi les auteurs ciotadens. Même si je ne vends pas de livres, c'est l'occasion de montrer l'espéranto : auteur de manuels, dont L'Esperanto Express - 6ème édition chez le Dauphin, ou Assimil de poche, je traduis aussi de l'espéranto en français ou du français en esperanto, une belle façon de faire circuler la culture ! cette année, j'avais rajouté les revues dans lesquelles je publie des articles (par exemple, «Economiser l'eau « dans « Juna amiko» à l'attention des jeunes, recension de films dans «Literatura foiro», articles plus généralistes dans «Monato», rapport de l'UNESCO sur l'enseignement dans Internacia Pedagogio Revuo. Parmi les visiteurs, peu de nouveaux, venus se renseigner mais beaucoup de gens qui me connaissent et sont venus dire «bonjour» dont le journaliste de 13600TV pour un entretien radio.



## Forumoj de Asocioj

*Renée Triolle*

Partopreno en Forumoj de asocioj estas rimedo por konigi, ne nur nian asocion, sed ĉefe Esperanton. En La Ciotat, la 6an de septembro, ni danku Pascal kaj M.Hélène, kiuj venis el Marseille por deĵori la tutan tagon. Plejparto el la vizitantoj estis konatoj, kiuj jam konas Esperanton, malmultaj estis «novuloj», scivolemaj, sed ĝenerale bone estis akceptita la ideo de justa neŭtrala lingvo. Kelkaj lasis sian adreson sed bedaŭrinde neniu vizitis la prezentlecionon merkredon la 10an.
En Marseille dimanĉon la 7an, dankojn al Frédéric, Marc, Renée, kiuj deĵoris la tutan tagon, al Pascal, kiu liveris la «materialon», M.Hélène, Sylvain kaj aliaj, kiuj informis la vizitantojn, akcentante la facilecon de la lingvo. Unu venis al la prezentleciono la 9an, ni vidos kiom da vizitos la kurson! Ĉiuokaze ni ne perdis nian tempon! «Ni semas kaj semas» skribis Zamenhof. Do ni semis!

Cercle de l'Avenir
la Lumière

despuèi 1856
CORRENS

# Dimanche 26 octobre 2025

Salle La Fraternelle à Correns

11h Conférence: l'Espéranto et son histoire

12h Apéro et repas ( couscous, glace)

15h Concert

Le chanteur polyglotte JoMo (Jean Marc Leclercq) se produira pour nous et chantera en plus de 20 langues. Il réalise le premier record de concert multilingue (22 chansons en 22 langues) et est inscrit en 2000 dans le Livre Guinness des records.

CORRENS
LA SENSATION D'UN PRIVILEGE
1er VILLAGE BIO DE FRANCE



Participation:

20 €

18 € ( adhérents)

Concert seul 10 €

ESPERANTO
INTERNACIA LINGVO

Inscription sur Hello Asso :https://www.helloasso.com/associations/cercle-de-l-avenir-correns/evenements/rencontre-avec-l-esperanto

Contacts: 06 80 73 35 02 06 84 45 18 51

# Bazilio-Supo de Mia Avino («pistou»-supo)

*Rosy Inaudi*

Vi trovos la plej bonaj legomoj por ĉi tiu recepto fine de la somero.

**Ingrediencoj :**



- 2 maturaj tomatoj
- 3 zukinoj
- 300g da fajnaj verdaj fazeoloj,
- 300g da plataj verdaj fazeoloj,
- 150 g da karotoj,
- 150g da blankaj kokosfazeoloj,
- 150g da ruĝaj kokosfazeoloj,
- 3 terpomoj,
- olivoleo • 1 bazilia folio• 4 ajlaj bulboj
- 100g da parmezana fromaĝo,
- 100g da nederlanda fromaĝo,
- 120g da mallongaj makaronioj.

**Preparado :**

1 - Tranĉu la platajn verdajn fazeolojn en malgrandajn 1cm pecojn, kune kun la zukinoj, karotoj kaj terpomoj post senŝeligado.

2 - Elguŝigu la ruĝajn kaj blankajn kokosfazeolojn.

3 - Boligi ĉiujn legomojn en 2.5L da akvo dum 1 horo.

4 - Dume, preparu la « pistou » miksante la ajlon, bazilion kaj 2 senŝeligitajn kaj drenitajn tomatojn.

Aldonu la 2 fromaĝojn kaj olivoleon por formi paston.

5 - Kiam la legomoj estas kuiritaj, aldonu la makaroniojn kaj kuiru dum la indikita tempo (kutime 6 ĝis 10 minutoj).

6 - La bazilio-supo estu dika; ĝustigu se necese, aŭ aldonante akvon aŭ iomete pistante la legomojn.
Ne forgezu sali.

7 - For de la fajro, verŝu la « pistou » en la supon.
Bone miksu kaj tuj servu.

# À noter sur votre agenda



## Dans notre fédération

***Plusieurs cafés linguistiques "esperanto" :***

**1er jeudi de chaque mois - 18h - Marseille (13)**

La Passerelle - 26 rue des Trois Mages (près du Cours Julien) - 6ème

*infos : Thierry Spanjaard - 06 09 18 28 51*

**Dernier jeudi de chaque mois - 17h - Lorgues (83)**

"Carnets de voyage" - 12 avenue Allongue (rue face à la mairie)

*infos : Jean-François Cousineau - 06 82 53 52 02*

## En France

*pour les séjours à Grésillon ou Kvinpetalo, voir les sites respectifs*

**Baugé (49) - Château de Grésillon**

http://gresillon.org/?lang=fr

**Bouresse (86) - Kvinpetalo**

http://www.kvinpetalo.org

**Novembre 22-23 - La Garde (83) :** Kultura semajfino en La Garde

*infos : Marc Gallardo - 06 09 89 09 14 - gallardomarc@ymail.com*

## Kultura semajnfino en LA GARDE, la 22an-23an de novembro 2025

Plian fojon, Esperanto-Provence proponas al vi dutagan semajnfinon en feriejo Masacan en La Garde (facile atingebla per aŭtobuso el la stacidomo de Toulon). Bela okazo kunvivi kun aliaj esperantistoj, praktiki la lingvon dum la manĝojn kaj ankaŭ dum la «kursoj». Bela okazo ankaŭ promeni tra la parko aŭ malsupreniri ĝis la maro!

Ni proponas kursojn : **nivelo 1 Renée Triolle** konversacio

**nivelo 2 Jean-Pierre Cavelan** : pri esperantismo

**nivelo 3 Pascal Vilain** : «Iom da kulturo - Esperanta sed ne nurtra faktoj kaj strangaĵoj» pri iama samideano el Nord-Francio

**kultura vespero** : ne forgesu ion prepari : kanzonon, skeĉon, muzikpecon,bildojn. La vespero estas via

Ĉiuj el vi havos la eblecon interveni, paroli, doni siajn ideojn! Ne timu! Anoncu vin. Ni ne dubas, ke ĉiuj el vi havas ideojn : kiel tiu mirakla solvo al interkomunikado ne altiras pli da interesitoj?

Plenigu la aliĝilon kaj ĝuu kun ni!